# Idiotismoj

Multaj lingvoj havas esprimojn, kiuj havas idiotismajn signifojn tre malsimilajn al siaj laŭvortaj signifoj. Iom da ili konfuzas, aliaj amuzas.

Jen kolekto de tiaj esprimoj, kontribuita de vi. Se vi ne povas trovi vian preferatan idiotismon, bonvolu aldoni ĝin ĉe la taŭga paĝo (kaj se la lingvo ne estas malsupre, bonvolu aldoni ĝin).

Jen fino de defino de idiotismoj … ligilo al artikolo en Vikipedio:
https://eo.wikipedia.org/wiki/Idiotismo

Sed nun mi ŝatus prezenti al vi idiotismojn, kiuj ne estas menciitaj en vikipedia artikolo kaj mi lernis pri ili dum kurso de esperanto por progresintoj de Normand Fleury el Kanado dum la 71-a IJK en germana urbo Wiesbaden.

Agli: E. kiu ĉiam korektas la lingvaĵojn de ĉiuj; E. ĉiam verkas kritikajn artikolojn aŭ kritigas la movadon (kaj ankoraŭ io, sed mi ne kapablas tion legi)

Aranei: uzas esperanton nur pere de la reto; nur retumas

Azeni: kun obstinaj opinioj kaj ideoj pri ĉio

Besti: uzas idiotismajn verbojn en esperanton

Bovi: ĉiam parolas pri sama ideo, temo

Elefanti: okupas tutan lokon en e-klubejo; konas parkere la tutan historion de la e-movado

Fiŝi: venas al klubejo aŭ kongreso sed apenaŭ parolas, simple silentas kaj aŭskultas

Hundi: fidele sekvas la rekomendojn de la akademio

Kameli: ne trinkas alkoholaĵojn

Kanarii: ĉiam emas kanti dum e-renkontiĝoj

Kangurui: iras de unu e-aranĝo al aliaj, do pluraj e-aranĝoj sinsekve; nur vojaĝas per pasporta servo de esperantisto al esperantisto

Kapri: ĉiam plendas pri ĉio (vetero, ktp.) aŭ – kun barbo kaj kiu fieras pri ĝi

Koki: tre entuziasme kaj troige propagandas esperanton; ĉiam ĉeestas matenmanĝon dum IJK aŭ alia junulara aranĝo

Kokini: volas nepre havi denaskulojn

Krokodili:

Kunikli: iras al renkontiĝo cele al seksumado; starigas multajn esperantajn asociojn, kreas multajn e-retejojn; ĉiam havas novajn ideojn por la movado sed ne realigas ilin

Lacerti: nur sunumas, kafumas kaj ripozas dum e-renkontiĝo

Leoni: nur prezidas asocion sen agi

Lupi: ne vegetara, nek vegana

Meleagri: kiu postkuras plurajn junajn virinojn samtempe (?)

Musi: aĉetas e-librojn sed ne legas ilin

Papagi: prelegas kvazaŭ sperte sen diri ion gravan aŭ interesan

Pavi: rimarkeble bele vestas sin por iri al diskejo aŭ uk-bankedo; kiu surhavas amason de e-pingloj aŭ esperantaj juveloj; kiu laŭdas sin kapabli plurajn lingvojn

Porki: terure agas en amasloĝejo

Rati: diskrimema al gejoj ktp.

Ŝafi: ĉiam sekvas grupon aŭ aliĝas al ĉiuj ekskursoj dum UKo